En sekvonta artikolo, mi aplikos la « leĝon pri kaŭzacio » al la ĉefa demando pri instruado de la lingvoj.

Komandanto Ch. Lemaire.

Tradukis Jos. Jamin.

SIMPLICITÉ AVANT TOUT !

Nous attirons spécialement l'attention de nos amis Espérantistes sur la critique ci-dessous reproduite, que nous traduisons de l'excellent journal anglais « The British Esperantist ».

Nous ne saurions trop le répéter : l'Esperanto est beaucoup plus simple que ce que prétendent nous montrer certains commentateurs ; les règles de Zamenhof que nous reproduisons une fois par mois sur la couverture du journal sont brèves et concises, elles ne laissent place à aucun doute et nous engageons tous les Espérantistes à les appliquer strictement en ne tenant aucun compte des règles et cas supplémentaires, créés par certains auteurs qui ne parviennent pas à se débarrasser du bagage encombrant de leur langue maternelle.

Practical and Theorical Esperanto. By Dr Max Talmey, New-York.

« Ce petit livre nous présente l'Esperanto au « point de vue grammaire, et, sans doute, il sera « utile à ceux que leur tendance d'esprit porte à « envisager le sujet à ce point de vue.

« La façon de traiter de l'Esperanto de diverses « manières selon les genres divers de lecteurs aux- « quels on s'adresse est, d'un côté justifiée par la « diversité même de l'esprit humain, et est d'autre « part, permise par la pleine perfection de ce lan- « gage lui-même.

NEPRE SIMPLECO !

Ni altiras speciale la atenton de ĉiu kaj ĉia esperantista amiko al la kritiko sube reproduktita, kiun ni tradukas el la bonega angla ĵurnalo « The British Esperantist ».

Neniam ni tro ripetus tion : Esperanto estas multe pli simpla ol tio, kion pretendas montri al ni la komentariantoj ; la regularo de Zamenhof, kiun ni presas po unu fojo ĉiumonate sur kovrilo de la ĵurnalo, estas mallonga kaj preciza, ĝi ne permesas ian dubon kaj ni admonas ĉiun Esperantiston ke li aplikadu severe tiujn regulojn, forlasante ĉiun aldonitan regulon aŭ kazon, kreiitan de kelkaj aŭtoroj, kiuj ne sukcesas forjeti la obstrukceman proviziaro de sia gepatra lingvo.

Practical and Theorical Esperanto. By Dr Max Talmey, New-York.

« Tiu libreto prezentas al ni Esperanton laŭ « gramatika vidpunkto ; eble tia verko utilos por « tiuj kiuj, pro speciala emo de sia spirito, amas la « gramatikon.

« La diverseco de la esploroj pri Esperanto, laŭ « la diverseco de legantoj, estas kaŭzata por la « diverseco mem de la homa spirito ; ĝi estas ankaŭ « pravigata per la perfekteco de la lingvo.

« Pour notre propre compte, nous arrivons plus « directement à une compréhension juste de l'Espe- « ranto en ne peinant pas pour adapter ses formes « simples aux concepts grammaticaux plus com- « plexes acquis dans l'étude des langues naturelles.

« Pour ceux qui préfèrent la concision à son « contraire, le fait établi par Zamenhof qu'il n'y a « que deux cas, le nominatif et l'accusatif, semble « le comble de la simplicité, même sans son expli- « cation que les autres cas (qui se rencontrent en « latin) sont remplacés par le secours de préposi- « tions.

« L'auteur, cependant, écrivant vraisemblable- « ment pour les gens dont la tendance d'esprit « demande des développements intensifs, attribue « quatre cas au substantif et à l'adjectif en Espe- « ranto — nominatif, génitif, datif et accusatif.

« Mais on ne voit pas pourquoi il omet le vocatif « et l'ablatif du Latin; on ne voit pas non plus pour- « quoi après avoir entamé la création de cas fan- « taisistes, il ne ferait pas entrer dans sa déclinaison « autant de cas différents qu'il y a de prépositions « dans la langue. »

Ces lignes signées des initiales A. E. W. sont extraites de « British Esperantist ».

Belga Sonorilo donne toute son approbation à cette parfaite expression du bon sens.

Ceux qui ont eu la joie d'apprendre l'Esperanto avec le petit manuel des débuts, ce manuel où la grammaire tenait 7 petites pages, et l'introduction au dictionnaire 7 autres petites pages, ne voient pas sans le plus vif déplaisir la plupart des traités actuels dont le développement, totalement inutile, ne peut que faire croire à la complexité de l'Esperanto, et à lui faire perdre tout le mérite de sa grande simplicité d'où découle sa beauté.

Zamenhof n'avait parlé ni d'indicatif, ni de subjonctif, ni de paradigme de la conjugaison, ni de forme de concomitance, ni de tout ce bagage vieillot des langues vieillottes.

Il serait bon que gros Jean n'en remontre pas à son curé, et qu'on laisse à l'Esperanto les avantages de sa lumineuse simplicité.

La grammaire complète de l'Esperanto est dans les 5 pages et demie du Fundamento; qu'on y ajoute autant de pages pour exposer le jeu des affixes.

Puis que l'on donne de bons textes de lecture.

De bons textes! Tout est là!

Les commentaires de la grammaire espérantiste n'ont eu de raison d'être que pour expliquer, coûte que coûte, des textes qui n'étaient, en réalité, que du Français traduit littéralement en Esperanto.

Nous aurons l'occasion de revenir là-dessus, avec des exemples.

Bornons nous aujourd'hui à répéter que l'Esperanto doit se régler, sans exception aucune, sur le principe absolu de la *clarté du sens;* pour cela il doit exprimer *toujours*, directement et simplement l'*idée* à rendre.

A ceux qui seront pénétrés de ce principe le Fundamento suffira comme explications; ceux-là demanderont aux « commentateurs » de la simplicité espérantiste, d'aller se coucher.

B. S.

« Pri kio rilatas al ni, ni pli rapide atingos la « plenan komprenon d' Esperanto se ni ne penas « por alfari ĝiajn simplajn formojn al la pli mal- « simplaj gramatikaĵoj elpensitaj okaze de la lernado « de lingvoj naturaj.

« Por tiuj kiuj preferas mallongecon al longecon, « la regulo donita de Zamenhof laŭ kiu estas nur « du kazoj, nominativo e akuzativo, ŝajnas eksteror- « dinare simpla, eĉ sen la klarigo ke la aliaj kazoj « (de la lingvo latina) estas montrataj per prepo- « zicioj.

« Tamen la aŭtoro — skribanta verŝajne por « personoj kiuj amas senfinan klarigadon — donas « 4 kazojn al la substantivo kaj al la adjektivo « d'Esperanto, nome nominativo, genitivo, dativo « ed akuzativo.

« Nu, oni ne komprenas pro kio li forgesas « vokativon e ablativon; ankaŭ oni tute ne kom- « prenas pro kio, post kreado de fantaziaj kazoj, li « ne enkondukas en sia deklinacio tiom da diversaj « kazoj kiom da diversaj prepozicioj ekzistantaj en « la lingvo. »

La supran tekston, subskribitan de A. E. W., ni eltiris el « British Esperantist ».

Belga Sonorilo tute, tutege, aprobas tiun kaj tian perfektan esprimon de l' saĝo kaj de l' praveco.

Kiuj, kun ĝojo, lernis Esperanton nur per la tre malgranda lernolibro de l' komenco — en kiu lernolibro la gramatiko estis klarigata sur 7 malgrandaj paĝoj, kaj same la enkonduko en la vortaro sur 7 aliaj malgrandaj paĝoj — tiuj tute malŝatas la plimulton de l' nunaj lernolibroj; de ĉi tiuj la longeco, la detaleco, la disvolveco, tute senutilaj, eĉ tute malutilaj, eble kreos la ideon ke Esperanto estas malsimpla kaj forprenos de nia kara lingvo ĝian grandan simplecon el kiu naskiĝas ĝia beleco.

Zamenhof priparolis nek pri indikativo, nek pri subjonktivo, nek pri paradigmo (modelo) de l' konjugacio, nek pri formo kunestanta, nek pri la garnituro malnovaĉa de malnovaĉaj lingvoj.

Estas plivole dezirinda ke la lernito ne tro instruas sian lerninton; tiel oni lasos al Esperanto la profitojn de ĝia mirindega simpleco.

La tutan gramatikon d' Esperanto oni trovas sur la 5 kaj ½ paĝoj de l' Fundamento; al ĝi aldonu la saman nombron da paĝoj por klarigi la funkciadon de la afiksoj.

Poste oni donu, taŭgajn tekstojn por legi.

Taŭgaj tekstoj! Jen estas la vero, la vera vero!

La komentarioj pri l' esperanta gramatiko fariĝis necesaj por klarigi, ĉiurimede, tekstojn kiuj, reale, estis nur Francaĵo tradukita laŭvorte en Esperanto.

Ni de nove priparolos la suprediritan aferon, pri kiu ni donos ekzemplojn.

Hodiaŭ ni nur rediros ke Esperanta lingvo devas obei, sen ia ajn escepto, la absolutan principon pri la *klareco de l' senco;* por tio, ĝi devas, *ĉiam*, esprimi, senpere kaj simple, la *ideon* esprimotan.

Pro kiu konvinkiĝos je tia principo, la Fundamento tute sufiĉos sen ia klarigo; kune kun ni, tiu konvinkito rogos de la « komentariistoj » de esperanta simpleco, ke ili bonvolu lasi al ni la trankvilecon kaj la fidon.

B. S.

KRONIKO DE LA GRUPOJ.

Bruxelles. — Le Comité Administratif du groupe « La Pioniro » s'est réuni mercredi soir, 27 février, et a élu son bureau, lequel est constitué comme il est détaillé au texte ci-joint. Rappelons qu'il est du devoir de tous ceux qui approuvent le mouvement Esperanto, d'encourager la formation de groupes; ils peuvent adhérer au groupe bruxellois en s'adressant au secrétaire M. Octave Chalon, au local; s'ils désirent recevoir des indications au sujet des cours organisés à Bruxelles, des livres d'études, etc., il suffira de les demander au groupe.

Les Statuts seront envoyés à la Ligue Espérantiste Belge et dès maintenant on a choisi comme futurs délégués, Melle Guilliaume et M. Chalon.

Le groupe se réunit régulièrement tous les mercredis au local « La Louve », 5, Grand'place.

— Le Cercle Polyglotte de Bruxelles fêtait le samedi 9 mars le onzième anniversaire de sa fondation. Des chants et récits dans les diverses langues enseignées au Cercle précédaient la sauterie de rigueur.

Mademoiselle Jessé s'était chargée de présenter l'Esperanto; elle l'a fait en déclamant d'une façon charmante l'harmonieuse poésie: *Nova Kanto*, de Dombrovski.

Toutes nos félicitations!

Antverpena Grupo Esperantista. — De leergangen voor damen, onder de leiding der ijverige en begaafde Mevr. Broymans, duren voor het oogenblik nog voort; die voor heeren in de « Taverne royale », worden, zooals in een vorig nummer werd gemeld, op 2n Februari geheven. Na eene opschorsing van een paar weken heeft men echter de werkzaamheden weder aangevat; de dagorde der zittingen begrijpt gewoonlijk eenen herhalingsleergang van een half uur, mededeelingen, spreekoefeningen in Esperanto, eene voordracht of voorlezing, deklamatie of zang.

De bijeenkomst van 23n Februari werd vooral gekenmerkt door de puike met lichtbeelden opgeluisterde voordracht « Tra la Svisaj Alpoj », waarvan hooger werd gesproken. Het verslag in het *Handelsblad* van 28n Februari opgenomen, geeft uitmuntend den algemeenen indruk weder; wij zijn dus zoo vrij uit dit relaas de volgende regelen te ontleenen:

« Wij bevonden ons weldra op weg naar het fantastische Zwitserland. De reis zelve beschrijven ware ons hier totaal onmogelijk; wij zullen ons vergenoegen te zeggen, dat wij zelden prachtiger reeks lichtbeelden te zien kregen: de schilderachtige landschappen, de statige sneeuwreuzen, de sombere dennenwouden, de betooverende ijsrotsen en bruisende watervallen volgden beurtelings op elkaar en brachten ons als 't ware ter plaatse zelf, want getrouwer kon de natuur op doek niet weergegeven worden.

« Dubbel aangenaam was ons die reis, daar men onderwege slechts Esperanto te hooren kreeg; de heer Van Melckebeke sprak ons immers gedurende een uur en half in zacht en vloeiend Esperanto, in de taal, die in de laatste tijden zulke reuzensprongen heeft gemaakt. »

Bruselo. — La Administracia Komitato de la grupo « La Pioniro » kunvenis dum la vespero de la merkredo 27a februaro kaj elektis sian estraron, kiu estas tiel starigita:

Prezidanto: Sro Lucien Blanjean;
Vicprezidantino: Fino Louise Hoffmann;
Vicprezidanto: Sro leŭtenanto Maurice Cardinal;
Sekretario: Sro Octave Chalon;
Dua Sekretariino: Fino Deluyck;
Kasisto: Sro Louis Vandersleyen;
Bibliotekisto: Sro Solot.

La Fonda Regularo estos sendata al la Belga Ligo Esperantista kaj de nun oni elektis kiel delegotojn: Fraŭlinon Guilliaume kaj Sron Chalon.

La grupo kunvenos regule ĉiumerkrede, en sidejo « La Louve », 5, Grand'place.

— La Poliglota Klubo de Bruselo festis, dum la 9a de Marto, la dekunuan datrevenon de ĝia fondo. Kantoj kaj deklamoj per la diversaj lingvoj instruitaj en la Klubo okazis antaŭ la festaj dancoj.

Fraŭlino Jessé prenis sur si la prezenton de Esperanto; ŝi faris tion, deklamante kun ĉarmo la harmonian poeziaĵon: *Nova Kanto*, de Dombrovski.

Gratulojn niajn!

Antverpena Grupo Esperantista. - La lerta kaj tre agema Sinjorino Broymans daŭrigas ankoraŭ sian instruadon; kiel ni, en antaŭa artikolo sciigis, la kurso por Sinjoroj finis de la 2a de februaro. Oni tamen reprenis sian laboron, post dusemajna libertempo; la tagordo de la kunsidoj, ordinare konsistas el duonhora ripetado, komunikoj, esperantaj interparoladoj, legado aŭ parolado, k. t. p.

La kunveno kiu okazis dum la vespero de la 23a de februaro, estis precipe interesa, pro la belega parolado, kun lumaj bildoj, « Tra la Svisaj Alpoj » de Sro Van Melckebeke. La raporto, kiun ni legas en « Het Handelsblad », tre bone tradukas la ĝeneralan impreson. El tiu artikolo ni prunte prenos jenajn liniojn:

« Baldaŭ ni estis vojaĝantaj al la mirindega Svisujo; priskribi iomete tiun vojaĝon detale, estas neebla; ni nur diru ke tre malofte ni vidis pli belan serion da lumbildoj: la pentrindaj pejzaĝoj, la grandegaj neĝmontaj, la malhelaj abiaroj, la ensorĉigantaj glacioj kaj bruemaj akvofaloj, intersekve malvolviĝis antaŭ niaj rigardoj, nin kvazaŭ en tiuj lakoj transportante: ĉar estus neeble, plifidele imiti la naturon sur tuko.

Des pli agrabla estis al ni tiu ĉi vojaĝo, ĉar ni estis nur aŭdintaj Esperanton; efektive, Sinjoro Van Melckebeke parolis dum unu horo kaj duono per tiu dolĉa, flua lingvo, kiu en la lastaj tempoj faris grandan paŝon. »

Voegen wij hierbij, dat de redenaar door den heer ondervoorzitter Van Schoor levendig werd geluk gewenscht en dat de aanwezige leden — ten getale van ruim 100 — de prachtige redevoering van hunnen voorzitter met daverend handgeklap hebben begroet.

— Veel aanwezigen insgelijks den volgenden zaterdagavond, 2n Maart. Er werd namelijk « la Lunanoj » voorgedragen, de « fantazio »; bij den tekst, die in de B. S. werd overgedrukt, had de spreker verscheidene luimige zetten van lokale kleur gevoegd, die menigmaal de aanhoorders in lustige stemming brachten.

— Op 9n Maart begon de heer A. Cassiers de lezing zijner welgeslaagde vertaling : *Kiom patrino kapablas suferi.* Tijdgebrek belet ons daarover nader uit te weiden. Groote bijval voor den vertaler, en talrijke aanhoorders.

— De heer Horowitz zendt ons uit Antwerpen een uitgebreid verslag over de voordracht aldaar door Juffrouw E Gunzburg in de groote zaal der koninklijke harmonie gehouden. Uit oorzaak van plaatsgebrek kunnen wij deze mededeeling niet in haar geheel opnemen, wij zullen enkel zeggen dat deze belangrijke redevoering aangaande « het nut van het Esperanto voor de Sionistische gedachte » een grooten bijval genoot bij de talrijke toehoorders, die op 31n Januari de talentvolle spreekster kwamen toeluisteren.

Na de voordracht drukte de heer Horowitz, in eene sierlijke aanspraak in Esperanto, de dankbare gevoelens der aanwezigen uit. Juffrouw Gunzburg antwoordde in dezelfde taal en bewees aldus feitelijk de welluidenheid en de degelijkheid van het Esperanto.

La verda Stelo. — De voordracht van Esperanto, ingericht door de jonge groep « La verda Stelo », heeft een overgrooten bijval genoten. De heer Van der Biest-Andelhof sprak er gedurende ruim een uur en onderhield een belangstellend en sympathiek publiek van een honderdtal personen over het doel en het nut van het Esperanto, zijne samenstelling en sierlijkheid, zijn tegenwoordigen toestand en zijne toekomst. De geestdriftige toejuichingen der aanwezigen bewezen ten volle, dat de woorden van den redenaar weerklank bij hen gevonden hadden.

Nadat de heer Fr. Schoofs den heer Van der Biest den dank der vergadering had overgebracht nam de heer Witteryck, de wakkere voorzitter der Brugsche groep, het woord om aan de nieuwe groep den groet der Brugsche vrienden over te brengen Hij maande de Esperantisten aan overal en altijd de groene ster tot erkenningsteeken te dragen en wenschte ten slotte allen voorspoed aan de Zurenborgsche groep.

Na de vergadering ontving het bestuur een twintigtal nieuwe bijtredingen.

Frameries. — M. A. Verbeken, professeur de langues modernes à Namur, a fait une conférence avec démonstration pratique de la langue, dimanche 24 février à l'Association des élèves diplomés de l'Ecole Industielle de Frameries.

M. Verbeken a reçu des félicitations pour le succès de sa conférence intitulée : L'Esperanto en une heure; on est intentionné d'organiser bientôt un cours d'Esperanto.

Ni ankoraŭ aldonu, ke la Vicprezidanto, Van Schoor, gratulis la paroladinton, kaj ĉirkaŭ cento da ĉeestantoj respondis al tiu belega parolado de sia prezidanto per resonegaj aplaŭdoj.

— Multe da membroj ankaŭ ĉeestis al la sekvanta sabatkunveno dum la 2a de Marto. Sro Van der Biest legis la fantazion, « La Lunanoj »; krom la teksto, en la B. S. presita, la parolanto aldonis diversajn tre spritajn, lokajn dirojn, kiujn ofte ĝojigis la aŭdantaron.

— Dum la kunveno de la 9a de Marto, Sro Cassiers eklegis sian bone sukcesintan tradukon « Kiom patrino kapablas suferi », de H Conscience. Pro tempo, neeble detaligi tiun verkon. Granda sukceso por la tradukisto kaj multnombra ĉeestantaro.

— Sinjoro Horowitz sendis al ni el Antverpeno detalan raporton pri parolado tie farita de Fraŭlino E. Gunzburg, en salono de la societo « Harmonio ».

Pro manko da loko ni bedaŭrinde ne povas eupresi tiun raporton tute, ni nur diros ke tiu interesa parolado pri « utileco de Esperanto por la Sionista ideo » ricevis grandan sukceson de la multnombra aŭdantaro, kiu je la 31a de Januaro aŭskultis la talentan parolantinon.

Post la parolado Sro Horowitz, esprimis, per lerta paroladeto en Esperanto, la dankemajn sentojn de la ĉeestantoj. Fraŭlino Gunzburg, respondante en la sama lingvo, fakte pruvis la belsonecon kaj taŭgecon de Esperanto.

La verda Stelo — La parolado pri Esperanto, organizita de la juna grupo « La verda Stelo », ricevis grandan sukceson. Sro Van der Biest-Andelhof dum pli ol unu horo parolis al atenta kaj simpatia aŭdantaro de cento da personoj pri la celo kaj la utileco de Esperanto, ĝia kunmetado kaj eleganteco, ĝia nuna stato kaj estonteco. La entuziasmaj aplaŭdoj de la ĉeestantoj plene pruvis ke la paroloj de la parolanto trovis akcepton ĉe ili.

Poste, kiam Sro Fr. Schoofs estis gratulinta la parolanto kaj prezentinta al li la dankon de la aŭdantaro, ekparolis la brava prezidanto de la Bruĝa grupo, Sinjoro Witteryck, por alporti al la nova grupo la saluton de la Bruĝaj amikoj. Li konsilis al ĉiu esperantisto, ĉiam kaj ĉie surmeti la verdan steleton kiel signo de rekono kaj bondeziris plenan prosperon al la Zurenborga klubo.

Post la kunveno, la komitato de la grupo ricevis dekduon da novaj aliĝoj.

Frameries. — Sro A. Verbeken, profesoro de modernaj lingvoj en Namur, faris paroladon kun praktika montro de la lingvo dum la dimanĉo 24a februaro, ĉe la Asocio de la diplomitaj lernintoj de la Industria Lernejo de Frameries.

Sro Verbeken ricevis gratulon pri sukceso de sia parolado titolita : Esperanto, plena sciigo ricevita dum unu horo; oni intencas aranĝi baldaŭ Esperantan kurson.

Belga Ligo Esperantista.

La kunveno de la komitato okazos baldaŭ. Du tagoj estas proponitaj: la dimanĉo 24a de Marto aŭ 7a Aprilo. La tagordo enhavos interalie la demandojn pri konsuloj, pri profesoraj diplomoj (atesto pri kapableco), akcepton de novaj grupoj, k. c. Speciala sciigo estos adresita al la prezidantoj de la ligaj grupoj post kelkaj tagoj.

NEKROLOGIO.

La morto trafis unu el la membroj de la Antverpeno Grupo Esperantista, Sinjoron Prosper Prist; li mortis tridekokjara je la 16a de februaro 1907. — Bonvolu lia funebranta familio akcepti nian sinceran kondolencon.

POŜTA KESTETO.

E. Jacquart, *47, rue du Grand Central, Charleroi* (Belgique) deziras korespondi kun fremdaj Esperantistoj.

NIAJ ĴURNALOJ.

Internacia Scienca Revuo estas nun Oficiala Monata Organo de la Internacia Scienca Oficejo Esperantista en Ĝenevo.

Tiu taŭga revuo eniras sub novaj aŭspicioj en sia kvara jaro de ekzistado kaj la nova redakcio estas konsekvenco de la dua Universala Kongreso de Esperanto.

Niaj legantoj tre bone scias la grava helpo, kiun alportas al nia afero la sciencularo; ĝia organo estas por ni unu el la plej konvinkantaj pruvoj de la neceso de la lingvo por la teknikaj temoj.

La nomoj, kiujn ni vidas en la komitato, certigas al ni ke la direkto de la ĵurnalo klopodos por ricevi en la ĵurnalo, la plej interesajn verkojn de la plej famaj aŭtoroj.

La abono estas 7 frankoj ĉiujare; sin turni al la Scienca Oficejo, 8, rue Bovy-Lysberg, Genève.

Esperanto. Duonmonata internacia gazeto, sub formo de ordinara ĵurnalo, reaperis post mallonga halto, starigita sur tute nova fundamento kaj gvidota de nova direkcio.

Tiu ĵurnalo taŭgas multe por la propagando; krom la Esperantista parto, ĝi enhavas artikolojn en franca, angla, germana kaj itala lingvo; apartan eldonon bulgaran oni povas ankaŭ aboni.

Abono : Unu jaro . . . . . fr. 3.00
Helpabono. . . . . fr. 10.00

Sin turni, 8, rue Bovy-Lysberg, Genève.

La Pioniro, gazeto Esperanta India, ekzistas jam de kelkaj monatoj, sed humile ne konatiĝis al siaj eŭropaj kunfratoj ĉar ni nur ricevis ĝian sesan numeron (Decembro). La gazeto estas tre bela eldono, vere interesa, kaj montras dokumente la progresojn, kiuj elvenas de taŭga kaj inteligenta propagando. Kun la Japana revuo, La Pioniro estas ĵurnalo kiu montras pruvon de internacieco kaj bonan respondon al la skeptikuloj, kiuj neigas ĝian praktikecon.

Ĝi estas publikita de la « Kolar Gold Field Esperanto Club » en Madras.

La kosto de la abono estas kvar pencoj monate en Indio aŭ eksterlande.

La adreso : Champion Reef, Mysore State, South India.

Eksport-Ĵurnalo estas la nova, anoncita revuo por Komerco, Industrio kaj Tekniko. Ĝia unua numero (10a februaro) enhavas jam grandnombron da reklamoj komercaj kaj tre interesajn artikolojn pri Registrado laŭ la decimala sistemo de Dro Hanauer (Traduko de la broŝuro de la Instituto Internacia de Bibliografio sidante en Bruselo) kaj pri aparato por aŭtomatika kaj tuja blokado uzita en mekanika konstruado. La ĵurnalo naskiĝis do tre bela kaj certe havos grandan influon pro ĝia komerca flanko.

Abono : 1 markoj germanaj, por ĉiuj landoj. Rogu la tarifon pri anoncoj.

Sin turni : Eksport-Ĵurnalo « Union », Esperanto-Verlags-Gesellschaft, Frankfurt a. M. (Germanlando).

The American Esperanto Journal estas la dua ĵurnalo kiu aperas en Unuigitaj Ŝtatoj. Ĝi havas tre belan amplekson kaj interesajn artikolojn pri diversaj temoj kaj eĉ poeziaĵojn kun angla traduko.

Ĝi anoncas tre gravan movon pri nia afero en Ameriko ĉar ĝi estas la oficiala organo de la « American Esperanto Association » kaj de la grupoj en Boston, Chicago, New-York, Philadelphia, Los-Angeles, Seattle, k. t. p.

Ĝi aperos ĉiumonate kaj la abono estas unu dolaro (5 fr.).

Sin turni al la redaktoro, Boulevard Station, Boston, Mass. U. S. A.

Al la Esperantistaj Sportistoj !

La franca ĉiusemajna revuo **Tous les Sports**. (Ĉiuj Sportoj) oficiala gazeto de la « *Unuiĝo de la Francaj Societoj de Sportoj Atletaj* », enpresas regule kronikon en Esperanto pri la ĉefaj sportoj okazintaĵoj. Tio estas *tre grava* por la disvastigo de Esperanto en la Sportistaro ĉar la U. S. F. S. A. regas sur pli ol mil societoj kaj almenaŭ 100.000 atletoj.

So *Louis de Gaesnel*, kiu verkos tiun kronikon treege rogas korespondantojn kompetentajn en ĉiuj landoj por sendi al li sportajn sciigojn kaj elekti la necesajn teknikajn vortojn kaj esprimojn pri la diversaj sportoj.

Sin turni senpere al li, Esperanta konsulo, *Chartres*, France.

SCIIGOJ DIVERSAJ.

Tutmonda Esperantista Poŝkalendaro por la jaro 1908a. En la fino de l' nuna jaro la firmo *Esperanto Verlag Möller & Borel*, Berlin, eldonos tutmondan esperantistan Poŝkalendaron por la venonta jaro. Ĝi enhavos en praktika kaj oportuna formato kaj aranĝo interesan materialon por Esperantistoj, diversajn sciigojn internaciajn, kiujn oni alie devas serĉi en multaj apartaj verkoj: tabelojn, adresojn, k. t. p.

La redaktadon prenis sur sin Sro J. Schröder, Wien, VII. Kaiserstrasse, 10, kiu volonte akceptos proponojn aŭ dezirojn de nia legantaro por tiu ĉi celo kaj plenumos ilin laŭ ebleco.

Ni insiste petas ĉiujn grupojn, klubojn, konsulejojn aŭ informejojn, sendi la precizajn adresojn al la nomita redaktoro, samtempe la hoteloj kaj firmoj, kiuj uzas Esperanton parole aŭ skribe, estas petataj sciigi lin pri tio.

Anoncoj por la Kalendaro estas akceptataj jam nun de Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin S., Prinzenstr., 95. La prezo de l' Kalendaro estos malalta, tial ke ĉiu Esperantisto en la mondo povu aĉeti ĝin.

La bankera kontoro N. D. Kovoĉeff ul « Trapezica » no 4, en Sofio (Bulgario), havas la honoron sciigi la fremdajn komeristojn, industriajn fabrikojn kaj firmojn ke estas malfermita, en la kontoro, komisia fako komercista por *Reprezenteco* de la fremdaj diversaj artikoloj, industriaj eltrovaĵoj, plej-novaj elpensaĵoj, k. c.

Ĝi posedas tre agemajn vojaĝ-agentojn en tuta Bulgario.

Estas rogataj la interesantoj alsendu al la kontoro siajn proponojn kaj kondiĉojn kun specimenoj de siaj komercaĵoj.

Oni korespondas Esperante.

RECETTES CULINAIRES.

CHOUX VERTS AUX SAUCISSES.

Coupez des choux frisés par quartiers, enlevez la grosse côte du milieu. Faites-les cuire à moitié, à l'eau bouillante et salée. Après les avoir égouttés, mettez-les dans une casserole avec une cuillerée à pot de bouillon, de bonne graisse de rôti ou de volaille, sel, poivre et muscade râpée, et une douzaine de saucisses. Couvrez la casserole et laissez cuire pendant trois quarts d'heure. Découvrez ensuite et faites réduire s'il y a trop de liquide. Arrangez les choux sur le plat et les saucisses par-dessus.

KUIREJAJ ORDONOJ.

VERDAJ BRAZIKOJ KUN KOLBASETOJ.

Tranĉu kvarige frizitajn brazikojn, kaj forĵetu la dikan mezan nervaĵon. Kuirigu ilin duone, en akvo bolanta kaj salumita. Post ke vi estos elgutiginta ilin, vi ilin metu en kaserolo kun plenkulero da bolsupo, da bone rostaĵa aŭ kortbirdaĵa graso, salo, pipro kaj pulverigita muskatnusko, kaj dekduo da kolbasetoj. Kovrigu la kaserolon kaj faru ke la tuto kuiru dum tri kvaronoj da horo. Malkovrigu kaj vaporigu la superfluon da fluidaĵo. Aranĝu la brazikojn sur plado kaj la kolbasetojn supre.

VATELINO.

BIBLIOGRAFIO.

Eine Weltsprache oder drei? Antwort an Herrn Professor Diels, von Prof. Louis Couturat.
Sonderabdruck aus der « Deutschen Revue », Herausgegeben von Richard Fleischer.
Deutsche Verlags-Anstalt. — Stuttgart und Leipzig.

——

Franca Gramatiko por Esperantistoj de Paul Boulet, antaŭparolo de S^ro E. Boirac.
Ĉe la aŭtoro, 80, Boulevard du Prince Albert, Boulogne-sur-Mer (France). . . . . fr. 1.50

——

Corrigé de l'Ekzercaro de la Lingvo internacia Esperanto, par L. de Beaufront.
Ĉe Hachette et Cie, Paris. . . . . fr. 0.60

——

La Floro de l'Pasinto, unuakta drameto el vivo itala de Edmondo de Amicis, tradukita de Rosa Junck.
Ĉe G. Warnier, 46, rue Ste Anne, Paris, 2e.

——

Esperanto à l'usage des Français, par H. E. Palmer.
Bruges: A.-J. Witteryck-Delplace, eldonisto, Nouvelle Promenade, 4 . . . . . fr. 1.25
Pri apero de tiu nova lernolibro ni rogas niajn gelegantojn ke ili atente legu, en tiu ĉi numero, nian artikolon titolitan: Nepre simpleco. B. S.

——

Practical business letters in Esperanto with Key. Praktikaj komercaj leteroj, de J.-C. O'Connor and P.-D. Hugon.
London, Guilbert Pitman, 85, Fleet Street, E. C. . fr. 1.30

Pri unu speco de kurbaj linioj koncernante la V^an Eŭklidan postulaton, verkita de A. Dombrovski, 2^a eldono . . fr. 0.65
Pri novaj trigonometriaj sistemoj, originale verkita de profesoro A. Dombrovski . . . . . fr. 1.80
Ambaŭ libroj eldonitaj de Esperanto-Verlag Möller & Borel, Prinzenstrasse, 95, Berlin. S.

——

Sur vojo al kunfratiĝo de popoloj de A. A. Saĥarov, kolekto da artikoloj, lingvo rusa kaj Esperanto.
Ricevebla de Esperantista Societo en Ardatova, Simb. gub. (Ruslando) . . . . . fr. 2.00

——

Die internationale Hilfssprache und das Esperanto von Wilhelm Ostwald. Parolado farita en la Supera Lernejo de Komerco el Berlin . . . . . fr. 0.25
Möller & Borel, Prinzenstrasse, 95, Berlin, S.

MUZIKO.

Himno, kanto Esperantista, poezio de Dombrovski, muziko de S^ino Josée Guivy . . . . . fr. 1.25
Birdoj forflugu, valso kanta, poezio de Guido Gezelle, tradukita el flandra lingvo de D^ro M. Seynaeve, muziko de S^ino Josée Guivy . . . . . fr. 1.60
Ambaŭ aĉeteblaj ĉe Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

PROBLEMOJ.

PROBLEMO 33^a (de Plantano). — *Danaskita triangulo:* Vokalo — sufikso — radiko de participa formo — ne-nature — meze — ofte ĝi estas babilado — adjektiva formo de kolekto — amfibia besto — tre dezirata metalo — antaŭ la nomoj — vokalo.

Figuro:

```
.
. .
. . .
. . . .
. . . . .
. . . . . . . . . .
. . . . .
. . . .
. . .
. .
.
```

PROBLEMO 34^a (de Plantano). — *Lozanĝo:* Konsonanto — nek antaŭe nek poste — densan vaporon — de l'unua tago la suno faris tion — malsuda — tia estas la Patro en la ĉielo — konsonanto.

PROBLEMO 35^a. — M — N.

PROBLEMO 36^a (de S^ro Champy). — vi mi.

PROBLEMO 37^a. — Mia tuto konsistas el kvar konsonantoj elparolataj unu post la alia. I kaj III esprimas kvazaŭ econ de io en kio la fingro eniĝas, ne tamen difektante ĝin dum premo. — II kaj I formas vorton montrantan kion ajn. — IV kaj III estas « ne malgrandigita formo » de ŝipo, kaj returnite, ambaŭ estas ago ofte farata de virinoj, precipe de junaj. Trovu la tuton.

PROBLEMO 38^a. — Prepozicio — io kion oni deziras atingi — partoprenanto.

——

Oni sendu la solvojn al S^ro J. COOX, en Duffel, antaŭ la 30^a de Aprilo.
Oni bonvolu uzi nur poŝtkartojn por sendi la solvojn, kaj ĉiun karton nur por unu serio da problemoj.